



Boletín

n° 433 *Januario - Marto 2021*



Asociación de utilidad pública

Boletín

Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio
aperanta de 1949
Numero 433

Redakto-skipo
Direktado kaj kompostado: Ángel Arquillos L.
Revizio: J. A. del Barrio

Retadreso de la bulteno:
bulteno@esperanto.es
angelarquillos@gmail.com

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la
respektivaj aŭtoroj

* La redakcio rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn

*Republikado de enhavo nur permesita kun per-
meso de la redakcio aŭ de la aŭtoro

Financaj aferoj: financoj@esperanto.es

Aliaj aferoj (escepte de financaj):
admin@esperanto.es

Hispana Esperanto-Federacio *Federación Española de Esperanto*

Rodríguez San Pedro, 13, 3º, 7
ES-28015 Madrid
admin@esperanto.es
Bankokonto BBVA: ES85 0182 1252 31
0204011961
TRIODOS BANK: ES24 1491 0001 2420 0926
4025
Poŝtelefono: +34 638 547 104
Telefono: +34 914 468 079 (bv. lasi mesaĝon
en la aŭtomata respondilo)

Estraro	
Prezidanto:	Ángel Arquillos López
Vicprezidanto:	Alberto Granados Orcero
Sekretario:	Manuel Parra
Vicsekretario	Isidoro Ortega López
Kasisto.	Jesús M. García Iturrioz
Voĉdonantoj:	Vicente Manzano (Viko)
“	Ana Manero

Prezidanto HEJS
kaj voĉdonanto: William Guerrero

Presejo: Gráficas Notivol (Zaragoza)
DL: M-39811-2012 / ISSN 2444-8400

SALUTVORTOJ

Malgraŭ la pandemio, ĉio enordas, kaj
iom post iom ni vidas la horizonton pli
luma kaj ni daŭre ripetas la vorton,
“espero” kaj kun pacienco atendas la
rezultojn de la scienco kaj la medici-
no.

Eventoj okazas ĉiutage, retaj kaj pape-
raj informiloj aperas ĉiutage, kursoj,
renkontiĝoj, kongresoj, okazas tre of-
te, ĉeeste kaj rete, kaj nenio haltos
nian agadon, ĉar Esperanto estas parto
de nia ĉiutaga vivo kaj per ĝi nia men-
so estas okupata kaj ni ne havas tem-
pon por enuiĝo.

Mi denove dankegas la kontribuan-
tojn, kiuj sindone sendas tekstojn pri
E-o kun la celo informi kaj amuzigi la
legantaron. Mi scias ke estas multaj el
vi, kiuj ne kuraĝas sendi ideon,
novaĵon aŭ simile, ne timu, la redakcio
bonvenigas ĉion kaj plezure trovos
spacon por vi, ĉar la bulteno estas ĉies
kaj pere de ĝi ni povas dialogi kaj
interŝanĝi ideojn. Viaj tekstoj povas
esti tre utilaj por riĉigi la enhavon.

Por la novuloj estas bona ilo por prak-
tikado kaj por la spertuloj, estas bona
okazo por malavare kunhavigi tiun
saĝan trezoron, kiu loĝas en ilia privi-
legia cerbo, kie nur profitigas sin
mem. Do, antaŭen, ne hezitu kunhavi-
gi vian valoran ŝarĝon pri saĝeco.

Ĝi estas rekomendo de:

La Redakcio

ENHAVO

Salutvortoj	1
Sukceso en rilatoj kun UNESKO	2
Asambleo Generala Ordinaria	3
Raporto pri Aktivaĵoj	5
Informo pri la Anaro de HEF	8
HEF-BUĜETO 2021	9
HEF SPEZO-KONTO 2020	10
Fundación Esperanto	14
Dokumentoj alvenintaj al la Biblioteko 2020	15
Nova ret-versio de la Vortarego	17
Projekto Lorca	19
75a Datreveno de la morto de Julio Mangada	20
Nekrologe	25
La Stranga Angulo	26
Fervojo submara inter Eŭropo kaj Afriko	29
Iom da matematiko	31

Ĉefkovrilo: Baldaŭ ĉio pliboniĝos...

SUKCESOJ EN RILATOJ KUN UNESKO KAJ MOS

UNESKO, la organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj pri Edukado, Kulturo kaj Scienco, unuafoje aperigis retan enketon en Esperanto, por kolekti vidpunktojn por baldaŭa raporto pri edukado. Ĝis nun pli ol dumil homoj plenigis la enketilon el ĉiuj mondopartoj, sed UEA faris alvokon por atingi pli altan nombron, kaj disvastigi la alvokon. La limdato estas la 30a de aprilo, kaj pliaj informoj aperis en artikolo de Libera Folio.

Aliflanke, la Monda Organizaĵo pri Sanoj de Unuiĝintaj Nacioj (MOS) anoncis la pretigadon de reta kurso “Enkonduko pri KOVIM-19: metodoj por detekto, prevento, reago kaj kontrolo”, tradukita al Esperanto en kunlaboro kun la asocio de medicinistoj UMEA kaj UEA. La adreso estas: <https://openwho.org/courses/enkonduko-al-KOVIM-19>. La kurso donas ĝeneralan enkondukon pri KOVIM-19 kaj novaperantaj spirvirusoj, kaj ĝi celas profesiulojn pri publika sano, administrantojn de okazaĵoj kaj homojn kiuj laboras por Unuiĝintaj Nacioj, internaciaj organizaĵoj, NRO-j kaj iu ajn persono kiu interesiĝas pri la temo. La lerncelo estas: priskribi la fundamentajn principojn de nova-perantaj spiraj virusoj kaj kiel efike reagi al eksplodo, kaj la kursodaŭro: ĉirkaŭ 3 horoj. Atestilo de sukceso estos havebla por partoprenantoj, kiuj akiris almenaŭ 80% de ĉiuj poentoj disponeblaj tra ĉiuj testoj.

ASAMBLEA GENERAL ORDINARIA

El Presidente de la Federación Española de Esperanto invita a los miembros de la asociación a participar en la Asamblea General Ordinaria, que tendrá lugar el domingo 6 de junio de 2021, a las 9:30 horas (a las 10:00 en segunda convocatoria) en la sede social, calle Rodríguez San Pedro, 13, 3º, de Madrid, con el siguiente orden del día:

- 1.- Lectura y aprobación del acta de la anterior asamblea (18 de octubre 2020)
- 2.- Aprobación de las cuentas y tesorería del 2020
- 3.- Aprobación de la Memoria de Actividades del 2020
- 4.- Informe de los socios
- 5.- Aprobación del Presupuesto para 2021
- 6.- Cuotas para el año 2022
- 7.- Proyectos para 2021-2022
- 8.- Ruegos y preguntas

IMPORTANTE: Los miembros de la Federación que deseen ser representados por algún otro socio, deben enviar un mensaje indicando claramente el nombre completo del representante y representado, al buzón electrónico: admin@esperanto.es o bien por correo postal a las oficinas de la asociación, antes del 2 de junio.

Se establecerán medios telemáticos para que los asociados puedan participar desde su domicilio, por medio de la cuenta de Skype de la Federación @esperantoes u otras que podrán ser consultadas con la Directiva.

El Presidente de la Federación

Ángel Arquillos López

ORDINARA ĜENERALA KUNVENO

La Prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio alvokas la anojn de la asocio partopreni Ordinaran Ĝeneralan Kunvenon, kiu okazos la 6-an de junio de 2021 (dimanĉe), je la 9:30 horo (je la 10:00 horo en dua alvoko), en la oficiala sidejo, strato Rodríguez San Pedro, 13, 3º, de Madrido, laŭ la jena tagordo:

- 1.- Legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa kunveno (18a oktobro 2020)
- 2.- Aprobo de la kontoj kaj kas-stato de 2020
- 3.- Aprobo de la raporto pri aktivaĵoj de 2020
- 4.- Informo pri la anaro
- 5.- Aprobo de la Buĝeto por 2020.
- 6.- Kotizoj por la jaro 2022
- 7.- Projektoj por 2021-2022
- 8.- Sugestoj kaj demandoj

GRAVAJ RIMARKOJ: La membroj de HEF, kiuj deziras esti reprezentataj fare de alia membro, sendu mesaĝon informante pri tio, klare indikante la kompletan nomon kaj de la reprezentanto kaj de la reprezentato, al HEF-a retpoŝta adreso admin@esperanto.es, aŭ per ordinara poŝto al la oficejo de la asocio, antaŭ la 2-a de junio.

Oni organizos telematikajn rimedojn por ke la anoj povu partopreni je distanco, pere de la konto de Skajpo de la Federacio [@esperantoes](https://www.skype.com/join/esperantoes) aŭ per aliaj kiujn oni povos interkonsenti kun la Estraro.

La Prezidanto de HEF

Ángel Arquillos López

RAPORTO PRI AKTIVAĴOJ 2020

1. INTERNA ADMINISTRADO

1.1. La estraro kunsidis 9 fojojn en tiu jaro, plej ofte en virtuala maniero.

1.2. Okazis du ĝeneralaj kunvenoj, ambaŭ per la reto; la ordinara okazis la 24an de majo kaj eksterordinara okazis la 18an de oktobro. En ĉi tiu, oni renovigis la estraron, kun ŝanĝo de pluraj estraranoj, unu el kiuj estis la prezidanto.

1.3. Oni eldonis kvar numerojn de “Boletín” (429, 430, 431 y 432) kaj naŭ numerojn de La Bitbulteno.

1.4. Biblioteko *Juan Regulo Pérez*: Ĝi daŭre estas alirebla de ĉiuj interesatoj, tamen nur HEF-anoj rajtas prunt-preni. Dum la jaro ĝi riĉiĝis per novaj eroj; baldaŭ aperos en “Boletín” la kompleta listo de la novaj akiroj.

2. ASOCIOJ

2.1. La lokaj kaj regionaj grupoj ĝenerale modifis sian funkciadon pro la pandemio, limigante siajn ĉeestajn aktivaĵojn kaj inventante aliajn per-retajn.

2.2. Fondaĵo Esperanto denove aljuĝis sian monhelpon por la agado de lokaj grupoj.

3. INSTRUADO KAJ TREJNADO

3.1. Membroj de HEF gvidis kursojn en kelkaj urboj tra la tuta ŝtato, precipe organizitaj de la lokaj kluboj. Iuj kursoj okazis ĉeeste, aliaj per interreto.

3.2. La Nacia Universitato de Neĉeesta Edukado (UNED) denove ofertis kurson de Esperanto en la lerno-jaro 2020-2021. La novaĵo estas la aldono de la nivelo B1, krom tiu A2. Ĉi tiuj kursoj estas kunorganizitaj de HEF per interkonsento subskribita oficiale kun la universitato. HEF zorgas pri la selektado de instruistoj, pretigas kriteriojn kaj ellaboras la materialon. HEF havigis propran diplomon al sukcesintoj de la kurso kiuj tion petis.

3.3. Instigite de membroj de HEF, la universitato de Sevilo organizis kursojn de Esperanto en la lerno-jaro 2020/2021, malfermajn por ĉiu homo interesita. Ili estas senpagaj, kaj povas taŭgi por ricevi poentojn (*créditos*) en la oficiala studado de la universitato.

4. KONGRESOJ

-Organizitaj de HEF aŭ ties aliĝintaj asocioj

4.1. Pro la pandemio ne povis okazi la hispana kongreso malgraŭ tio, ke ĝi estis jam perfekte organizita kaj havis pli ol cent aliĝintoj. Oni prokrastis ĝin dufoje, ĝis oni decidis okazigi ĝin en la jaro 2022 en la sama planita urbo: Comillas (Kantabrio).

-Partoprenataj de membroj de HEF

4.2. Kadre de la granda virtuala aranĝo *MondaFest'*, organizita de UEA, Hispana Esperanto-Federacio partoprenis interalie en la Virtuala Movada Foiro, prezentante siajn aktivadojn, kaj ankaŭ en la Tago de Eŭropo, okazinta fine de aŭgusto.

4.3. Unu membro de HEF estis elektita kiel vicprezidanto de TEJO dum la reta Internacia Junulara Kongreso.

5. INSTITUCIA KUNLABORO

5.1. Hispana Esperanto-Federacio partoprenis en la celebrado de “La tago de la verkistinoj”, laŭ alvoko lanĉita de la Nacia Biblioteko de Hispanio (Biblioteca Nacional de España, BNE). La konkreta agado temis pri registrado de kvin filmetoj kun laŭtleĝo de pecetoj de verkoj de hispanaj inaj aŭtoroj, en ĝia originalo kaj en ĝia traduko en esperanton. Tiuj filmetoj restis spekteblaj en la retejo de BNE.

5.2. La bita arkivo de Hispana Esperanto-Federacio, nomata Bitoteko, kiu apartenas al Europeana, la bita arkivo de la Eŭropa Unio, ricevis gravan renovigon, teknikan kaj forman, postulatan de tiu eŭropa institucio.

5.3. La gimnazio Almenara de la urbo Vélez-Málaga (provinco Malago) daŭrigis la projekton nomatan “Esperanto Komunikado” aprobita de la Eŭropa Programo Erasmus Plus. En 2020 la lernantoj de la mezlernejo kreis kaj publikigis videojn en aŭ pri esperanto, spekteblajn en Youtube.

5.4. Hispana Esperanto-Federacio subskribis oficialan interkonsenton pri eduka kunlaboro kun la Aŭtonoma Universitato de Madrido, por la organizado de ĉeestaj studoj kun ties studentoj. Kiel komenco, la interkonsento kovros la realigadon de esploro (kiel finkariera laboraĵo) en la fako Socia kaj Kultura Antropologio, kiu havos kiel celon la lingvon Esperanton kaj la esperantistan movadon.

6. ELDONADO

Dum 2020 HEF ne eldonis propran materialon, sed kontribuis en la disvastigo de libroj rilataj al la hispana kulturo.

7. DISVASTIGO (PRELEGOJ KAJ PREZENTOJ)

7.1. La 27an de februaro, okazis prelego-debato pri “Esperanto en la historio de la laborista movado” gvidita de José Antonio del Barrio (prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio) en la madrida kulturejo Espacio Olmo (Spaco Olmo).

7.2. Ankaŭ en februaro prelegis José Antonio del Barrio, la prezidanto de HEF en la sidejo de la liberala framasonismo en Madrido, pri la rilato inter Esperanto kaj Framasonismo aŭ framasonoj. Spektebla ĉe Youtube.

7.3. La 5an de novembro nia amiko Frédéric Neyret prezentis prelegeton pri Esperanto en alternativa kafejo-librejo Café dEspacio, en Las Palmas de Gran Canaria.

7.4. En decembro, okaze de la Zamenhofa tago, en Teruelo estis memorata la figuro de Julio Belenguer, pioniro de Esperanto en la provinco, per vizito al lia tombo en la municipa tombejo, en akompano de familianoj de la memorato.

7.5. La 15an de decembro oni festis la Internacian Tagon de Esperanto. La lokaj kluboj organizis diversajn aktivadojn kiel prelegojn, kuntagmanĝojn, prezentadon de libroj, ktp.

8. EKSPOZICIOJ

8.1.- De la 2a ĝis la 6a de marto estis montrita en Sagunto (Valencilando) ekspozicio pri Esperanto, en la kulturcentro "Mario Monreal". Ĝi estis akompanata de prelego, la 6an je la 7a vespere, en kiu partoprenis Alberto Granados, prezidanto de la teruela grupo Liberanimo kaj estrarano de Hispana Esperanto-Federacio, kiu parolis pri "Esperanto, lingvo internacia, neŭtrala kaj facila", kaj Raúl Salinas, prezidanto de la Grupo de Esperanto de Valencio, pri "Historio de Esperanto en Valencio".

8.2. Ekde la 21a de julio ĝis la fino de oktobro okazis ekspozicio pri Esperanto en la Publika Biblioteko de la urbo Lucena (provinco Kordovo, Andaluzio).

9. RETEJO KAJ SOCIAJ RETOJ

9.1. HEF flegas retpaĝon www.esperanto.es, kiu estas regule aktualigata. La domajno esperanto.es estas uzata ankaŭ por diversaj lokaj aŭ regionaj asocioj.

9.2. Bitoteko, la bita arkivo de Hispana Esperanto-Federacio, ricevis dum la jaro 2020 gravan renovigon, teknikan kaj forman. La rapida informadika evoluo devigis nin je granda teknika penado, kaj HEF devis dungi specialigitan entreprenon. Profitante la okazon, oni faris aliajn plibonigojn kaj ŝanĝis la fasonon kaj aspekton de la Bitoteko. La renovigo finiĝis kaj Bitoteko estas alirebla ĉe la kutima adreso: <https://bitoteko.esperanto.es/>

9.3. Daŭris la sendado de la "Bitbulteno", informilo sendata retpoŝte al la anaro kaj aliaj interesatoj unufoje monate. Ĝi estas dulingva (hispana kaj esperanta), kaj la nunaj ricevantoj estas pli ol 1100.

9.4. Sociaj retoj: HEF havas kontojn en *Facebook* kaj *Twitter*, kiuj estas regule uzataj por disvastigi informojn pri aktivaĵoj pri Esperanto. HEF ankaŭ flegas kanalon en *YouTube*, kie aperis, inter alio, serio de video-registraĵoj de homoj legante pecojn de El Quijote en esperanto. La junulara sekcio HEJS havas proprajn kontojn en *Facebook*, *Twitter* kaj *Instagram*. Ankaŭ funkcias diskutkanalo en *Telegram*.

10. AMASKOMUNIKILOJ

10.1. La gazetara servo de HEF sendis gazetarajn komunikojn, pri aferoj diversaj.

10.2. Sekve al tiuj komunikoj aŭ aliaj agadoj, aperis dum 2020 multaj aludoj, notoj aŭ artikoloj pri HEF aŭ pri Esperanto. Ekzemple:

La ĵurnaloj de la gazetargrupo Vocento, kun la plej granda regiona disvastiĝo en Hispanio, publikigis en sia suplemento “Vivir” la 10an de septembro ampleksan raporton pri Esperanto, kun deklaroj de la prezidanto de HEF kaj personaj atestoj de esperantistoj de diversaj urboj de Hispanio.

La 3an de oktobro la sama grupo de gazetoj aperigis alian artikolon kun mencioj al Esperanto, ĉifoje pri la historio de la trinkaĵo nomata Mirinda.

Okaze de la komenco de la reta kurso de la Esperanto-grupo de Valencio, la 3an de novembro, la alternativa radio Radio Klara elsendis intervjuon kun la prezidanto de la grupo, Raúl Salinas.

Alia apero de Esperanto en amaskomunikilo, pli anekdota, okazis la 2an de septembro en la televida kvizo El Cazador (La Ĉasisto) de la ŝtata televido TVE-1, kiun partoprenis Toño del Barrio. Dum ties apero oni faris aludon plurfoje al ties rilato al la lingvo, kaj oni eĉ inkludis diversajn frazojn en tiu ĉi lingvo, ankaŭ fare de aliaj partoprenantoj.

11. ALIAJ KULTURAJ AKTIVAĴOJ

Du membroj de HEF, la elstaraj verkistoj kaj tradukistoj Miguel Fernández kaj Miguel Gutierrez Adúriz plu aktivis kiel Prezidanto kaj Sekretario, respektive, de la skipo de gvidantoj de la Belartaj Konkursoj de UEA.

La Sekretario: Manuel Par

INFORMO PRI LA ANARO DE HEF 2020

Datumoj je 31/12/2020

- Individuaj membroj (OM, DM, PM kaj HM):	201
- Kolektivaj membroj (KM):	13
- Entute (individuaj +kolektivaj):	214
- Novaj aliĝoj en 2020:	11
- Malaliĝoj en 2020:	39

HEF-BUĜETO 2021

ENSPEZOJ

HEF-KOTIZOJ	6.500
UNED-KURSO	3.500
LIBRO-SERVO	2.100
MEL-UZO SIDEJO	150
ALIAJ	500

SUMO: **12.750**

ELSPEZOJ

BOLETÍN	3.000
UNED-KURSO (Instruistoj)	2.600
KOMPUTILAĴOJ	1.100
ELDONO DE LIBROJ	1.000
PROPAGANDO	1.000
INSTRUADO	1.000
NAJBARARA KOMUNUMO	800
OFICEJAJ MATERIALOJ	250
TELEFONO	500
LIBROAĈETOJ	200
POŝTO	100
BANKMAKLERAJĴOJ	300
KOTIZOJ UEA	250
KOTIZOJ EEU	150
ELEKTRO	250
SIDEJA ASEKURO	150
ALIAJ	100

SUMO: **12.750**

HEF-SPEZOKONTO 2020

ENSPEZOJ

	<u>2020</u>	<u>2019</u>	<u>DIFERENCO</u>
MONDONACOJ KAE	8.854,23		8.854,23
HEF-KOTIZOJ	5.984,00	6.472,00	-488,00
UNED-KURSO	3.253,00	3.380,00	-127,00
LIBRO-SERVO	657,60	1.321,09	-663,49
MEL-UZO SIDE		150,00	0,00
ALIAJ DONACOJ	5,00		5,00
SUBVENCIOJ	0,00	3.129,75	
HISPANA KONGRESO	0,00	300,00	

SUMO ENSPEZOJ: 18.903,83 14.752,84 +4.150,99

ELSPEZOJ

	<u>2020</u>	<u>2019</u>	<u>DIFERENCO</u>
BOLETÍN	2.998,38	3.063,72	-65,34
UNED-KURSO (Instruistoj)	2.439,75	2.535,00	-95,25
BITOTEKO	1.979,04		1.979,04
KOMPUTILAĴOJ	1.070,91	1.064,94	5,97
NAJBARARA KOMUNUMO	863,33	796,92	66,41
PROPAGANDO	565,06	368,90	196,16
TELEFONO	481,00	454,51	26,49
BANKMAKLERAJĴOJ	292,55	246,10	46,45
ELEKTRO	230,86	229,83	1,03
KOTIZOJ UEA	226,86	212,04	14,82
LIBROAĈETOJ	225,00	95,50	129,50
SIDEJA ASEKURO	133,76	134,31	-0,55
POŜTO	85,34	309,54	-224,20
DIVERSAJ	23,95	52,83	-28,88
MONHELPO PARTOP. IJK		1.000,00	
OFICEJAJ MATERIALOJ		161,05	
<u>SUMO ELSPEZOJ:</u>	<u>11.615,79</u>	<u>10.725,19</u>	<u>+890,60</u>

SALDO 31/12/2019: 49.329,35

SALDO 31/12/2020: 56.617,39 (+7.288,04)

PODETALE (31/12/2020):

BBVA	50.330,78
TRIADOS	3.223,63
UEA-konto	2.323,90
PAY PAL	558,92
MADRIDA KASO	180,16

SUMO 56.617,39

EJERCICIO 2020

FEDERACIÓN ESPAÑOLA DE ESPERANTO

ACTIVO	NO-TAS	2020	2019
A) ACTIVO NO CORRIENTE		62.390,91	62.390,91
I. Inmovilizado intangible.			
II. Bienes del Patrimonio Histórico.		2.289,70	2.289,70
III. Inmovilizado material.		60.101,21	60.101,21
IV. Inversiones inmobiliarias.			
V. Inversiones en entidades del grupo y asociadas a largo plazo.			
VI. Inversiones financieras a largo plazo.			
VII. Activos por impuesto diferido.			
B) ACTIVO CORRIENTE		61.130,39	53.808,35
I. Existencias.		4.513,00	4.479,00
II. Usuarios y otros deudores de la actividad propia.			
III. Deudores comerciales y otras cuentas a cobrar.			
IV. Inversiones en entidades del grupo y asociadas a corto plazo.			
V. Inversiones financieras a corto plazo.			
VI. Periodificaciones a corto plazo.			
VII. Efectivo y otros activos líquidos equivalentes.		56.617,39	49.329,35
TOTAL ACTIVO (A+B)		123.521,30	116.199,26
PATRIMONIO NETO Y PASIVO			
PATRIMONIO NETO Y PASIVO	NO-TAS	2020	2019
A) PATRIMONIO NETO		123.521,30	116.199,26
A-1) Fondos propios		123.521,30	116.199,26
I. Fondo Social.		116.199,26	111.344,61
1. Fondo Social.		116.199,26	111.344,61
2. Fondo Social no exigido *			
II. Reservas.			
III. Excedentes de ejercicios anteriores **			
IV. Excedente del ejercicio **		7.322,04	4.854,65
A-2) Ajustes por cambio de valor. **			
A-3) Subvenciones, donaciones y legados de capital y otros.			
B) PASIVO NO CORRIENTE		0,00	0,00
C) PASIVO CORRIENTE		0,00	0,00
TOTAL PATRIMONIO NETO Y PASIVO (A+B+C)		123.521,30	116.199,26

EJERCICIO 2020

ASOCIACION

FEDERACIÓN ESPAÑOLA DE ESPERANTO

	Nota	(Debe)	Haber
		Ejercicio N	Ejercicio N-1
		2020	2019
A) EXCEDENTE DEL EJERCICIO			
1. Ingresos de la entidad por la actividad propia		18.903,83	11.623,09
a) Cuotas de asociados y afiliados		5.984,00	6.472,00
b) Aportaciones de usuarios		4.065,60	5.151,09
c) Ingresos de promociones, patrocinadores y colaboraciones			
d) Subvenciones imputadas al excedente del ejercicio			
e) Donaciones y legados imputados al excedente del ejercicio		8.854,23	
f) Reintegro de ayudas y asignaciones			
2. Ventas y otros ingresos ordinarios de la actividad mercantil			
3. Ayudas monetarias y otros **		0,00	0,00
a) Ayudas monetarias			
b) Ayudas no monetarias			
c) Gastos por colaboraciones y del órgano de gobierno			
d) Reintegro de subvenciones, donaciones y legados*			
4. Variación de existencias de productos terminados y en curso de fabricación **		34,00	827,00
5. Trabajos realizados por la entidad para su activo			
6. Aprovisionamientos *			
7. Otros ingresos de la actividad			3.129,75
8. Gastos de personal *			
9. Otros gastos de la actividad *		-	-
		11.615,79	10.725,19
a) Servicios exteriores		-	-
b) Tributos		11.615,79	10.725,19
c) Pérdidas, deterioro y variación de las provisiones por operaciones comerciales			
d) Otros gastos de gestión corriente			
10. Amortización del inmovilizado *			
11. Subvenciones, donaciones y legados de capital traspasados a resultados del ejercicio		0,00	0,00

12. Excesos de provisiones			
13. Deterioro y resultado por enajenación de inmovilizado **		0,00	0,00
a) Deterioros y pérdidas			
b) Resultados por enajenaciones y otras			
A.1) EXCEDENTE DE LA ACTIVIDAD (1+2+3+4+5+6+7+8+9+10+11+12+13)		7.322,04	4.854,65
14. Ingresos financieros			
15. Gastos financieros *			
16. Variaciones de valor razonable en instrumentos financieros **			
17. Diferencias de cambio **			
18. Deterioro y resultado por enajenaciones de instrumentos financieros **			
A.2) EXCEDENTE DE LAS OPERACIONES FINANCIERAS (14+15+16+17+18)		0,00	0,00
A.3) EXCEDENTE ANTES DE IMPUESTOS (A.1 + A.2)		7.322,04	4.854,65
19. Impuestos sobre beneficios **			
A.4) VARIACION DE PATRIMONIO NETO RECONOCIDA EN EL EXCEDENTE DEL EJERCICIO (A.3 + 19)		7.322,04	4.854,65
B) INGRESOS Y GASTOS IMPUTADOS DIRECTAMENTE AL PATRIMONIO NETO			
1. Subvenciones recibidas			
2. Donaciones y legados recibidos			
3. Otros ingresos y gastos**			
4. Efecto impositivo**			
B.1) VARIACIÓN DEL PATRIMONIO NETO POR INGRESOS Y GASTOS RECONOCIDOS DIRECTAMENTE EN EL PATRIMONIO NETO (1+2+3+4)		0,00	0,00
C) RECLASIFICACIONES AL EXCEDENTE DEL EJERCICIO			
1. Subvenciones recibidas*			
2. Donaciones y legados recibidos*			
3. Otros ingresos y gastos**			
4. Efecto impositivo**			
C.1) VARIACIÓN DEL PATRIMONIO NETO POR RECLASIFICACIONES AL EXCEDENTE DEL EJERCICIO (1+2+3+4)		0,00	0,00
D) VARIACIONES DE PATRIMONIO NETO POR INGRESOS Y GASTOS IMPUTADOS DIRECTAMENTE AL PATRIMONIO NETO (B.1+C.1)		0,00	0,00
E) AJUSTES POR CAMBIO DE CRITERIO			
F) AJUSTES POR ERRORES			
G) VARIACIONES EN EL FONDO SOCIAL			
H) OTRAS VARIACIONES			
I) RESULTADO TOTAL, VARIACIÓN DEL PATRIMONIO NETO EN EL EJERCICIO (A.4+D+E+F+G+H)		7.322,04	4.854,65

FUNDACIÓN ESPERANTO

En nia esperanta mondo, multfoje nia agado estas farata sindoneme, eble pro la inspiro de la idealisma forto de nia interna ideo. Komprenibile, ni vivas meze de reala mondo kie multfoje la aferoj ne funkcias tiel.

Ekzemple, nia fondaĵo “Fundación Esperanto” estis kreata precipe por havigi ekonomiajn rimedojn por la celoj de la fondumo: stimuli la instruadon kaj disvastigon de la internacia lingvo Esperanto.

Tiusence, kelkfoje mi komentis, ke laŭ mia opinio, multfoje pli gravas agoj ol pagoj. Tamen, ĉio estas bonvena.

Nun, mi volas mencii du ekzemplojn:

La pasintan jaron, iu bonvola samideano surprizis nin per la donaco de 3.000 € al la fondaĵo. Tio por mi estis tute eksterordinara afero. Tiu malavara esperantisto petis, ke ni ne indiku lian nomon kaj ni respektas tian deziron (de tiu amiko de Bilbao) kiu eble montras ne nur bonfaremon sed diskretecon (Eble bono ne bruas same kiel bruo ne bonas).

Aliflanke, iu alia samideano, okaze de la 100jara datreveno en 2020 de la naskiĝo de la verkisto Miguel Delibes, proponis fari tute senpage la tradukon al Esperanto de iu romano de Delibes (nome: “Señora de rojo sobre fondo gris”, kiu estos “Sinjorino en ruĝo sur griza fono”). Post iom da tempo, ni esperas vidi la realigon de tiu projekto.

Mi volus aldoni, ke danke al kontribuoj kiel tiu supre menciata, la ekonomia rezulto de la pasinta jaro ne estis tiel negativa kiel la aktuala situacio povus igi. Do, ni esperas havi la ŝancon destini al helpoj pli ol oni povis supozi. Kvankam, eble konvenas mencii, ke en la sidejo de F. Esperanto, baldaŭ oni devos alfronti elspezojn pro la bezono fari riparojn kiuj rilatas al la komunumo de proprietuloj de la konstruaĵo.

Ni memoru la bankan konton de la fondaĵo al kiu eblas sendi kontribuojn, indikante la datenojn: En CaixaBank (ES15 2100 5553 3621 0040 6825). Ni aldonu, ke per tiuj kontribuoj oni rajtas dekalkuli de la pago pri IRPF de la donacinto je 10% de ties kontribuo (art. 68.3.b) de la Leĝo de IRPF).

Lorenzo Noguero

(Prezidanto de F. Esperanto")

DOKUMENTOJ ALVENINTAJ AL LA BIBLIOTEKO EN 2020

Dum la jaro 2020 eniris la bibliotekan katalogon sekvaj dokumentoj:

Donacinto: *Anonima*

Paluzie-Borrell, J. *Diccionario esperanto-español y español-esperanto : selección de 25000 voces con los términos usuales y científicos*, 1975

Zezulka, Josef. *Bytí*, 2019

Kongresa libro, 27-a Universala Kongreso de Esperanto, 1935

Dua bulteno, 91-a Universala Kongreso de Esperanto, 2006

Dua oficiala bulteno, 67a Universala Kongreso de Esperanto, 1982

Kongresa libro de la 75 HEK, 2016

Kongreslibro de la 20a Andaluzia Kongreso de Esperanto, 2016

Cervantes, Brel, De la Ville de Mirmont : Don Kihoto en Barcelono, La strebo, La morto de Sanço, 2019

Kongresa libro, 103-a Universala Kongreso de Esperanto, 2018

Donacinto: *Jorge Camacho*

Thomson, James. *La urbo de terura nokto*, 1977

Bello, Andrés. *La agrikulturo de la tropika zono*, 1995

Xu, Dishan. *Vaka monto kaj inspira pluvo*, 2017?

Eshilo. *Prometeo ligita*, 1982

Neto, António Agostinho. *Brulo kaj ritmo*, 1983

Goethe, Johann Wolfgang von. *Das Tagebuch*, 1984

Tolstoj, Lev Nikolaevič. *La morto de Ivan Iljiĉ*, 1997

Behrangí, Samad. *La nigra fiŝeto*, 2018

Salvado, António. *A poesia*, 2020

Donacinto: *Alejandro Escobedo*

Hartig, Heinz Dieter. *Aktivu, progresu*, 1976

Donacinto: *Toño del Barrio*

Kim, Onnuri. *Vojaĝo de Onia*, 2019

Lee, Jungkee. *Leteroj el Koreio*, 2013

Donacinto: José María Salguero

Kongresa libro, 63-a Universala Kongreso de Esperanto, 1978
Kongresa libro, 74-a Universala Kongreso de Esperanto, 1989
Kongresa libro, 42-a Universala Kongreso de Esperanto, 1957
Dua oficiala bulteno, 68a Universala Kongreso de Esperanto, 1983
Dua oficiala bulteno, 68a Universala Kongreso de Esperanto, 1983
Dua oficiala bulteno, 55a Universala Kongreso de Esperanto, 1970
Kongresa libro, XVI Hispana Kongreso de Esperanto, 1955

Donacinto: Walter Klag

Julia Isbrücker, 2020
Klag, Walter. *Stelo : la mono de la Esperanto-komunumo*, 2020
[Speciala medalo eldonita okaze de la 150a naskiĝdatreveno (1868-1943) de René de Saussure], (2 stelomoneroj), 2018

Donacinto: Antonio Valén

Privat, Edmond. *Tamen perdota*, 2003
Germana-Esperanta-Pola etvortaro pri lingvo kaj komunikado, 2008
Bernard, Roger. *Falsaj amikoj en Esperanto*, 1971
Komunlingva nomaro de eŭropaj birdoj, 1971
Statuto de UEA : versio proponita por aprobo en Ĝenerala Voĉdono, 2016
Kuropatnicka-Salamon, Halina. *Gutoj*, 2013
Plena ilustrita vortaro de Esperanto. Suplemento, 1987
Internacia jura revuo. N-36 (17/1987:2)

Donacinto: Leandro Trujillo

Discursos pronunciados el 24 de julio de 2020, salón de actos de la Real Sociedad Económica de Amigos del País de Tenerife, en la entrega del título de director de honor a D. Leandro Trujillo Casañas, 2020

Donacinto: Z4 Éditions

Vuillard, Éric. *Tagordo*, 2018

Trovu ĉi tiujn kaj aliajn dokumentojn en la retkatalogo de Biblioteko Juan Régulo Pérez: <http://biblioteko.esperanto.es/>

NOVA RET-VERSIO DE LA VORTAREGO

La Granda Vortaro Hispana-Esperanto (enhavanta proksimume 50.750 kapvortojn) sendube estas la vivo-verko de Fernando de Diego (1919-2005), ĵurnalisto kaj filologo, kiu aŭtoris ankaŭ du informo-riĉajn eseojn pri la arto traduki kaj la literatura kritiko. Li tamen ĉefe kaj prave famas kiel tradukisto, i.a de verkoj de Baroja, Bécquer, Castelao, Cela, Cervantes, Gallegos, García Lorca, García Márquez, Hemingway, London, Machado, Maupassant, Neruda, Stevenson kaj Valle-Inclán.

La informadika skipo de Hispana Esperanto-Federacio (nome Miguel Ángel Sancho, Daniel Molina, David Trigo kaj Ángel Sánchez de la Cruz), kunlabore kun Antonio Valén kaj Miguel Gutiérrez Adúriz, prilaboris novan ret-version de la vortarego. La malnova versio funkciadis dum multaj jaroj, kaj oni kreis ĝin siatempe nur kiel simplan eksperimenton, sed la tempo-paso montris, ke ĝi estas unu el la plej uzataj ret-servoj de HEF.

En tiu malnova versio abundis teknikaj problemoj, la uzado ne estis aparte komforta kaj mankis kelkaj nuancoj de la originala verko en la datumbazo, neniam aktualigita aŭ korektita. La nova programo disponigas al la uzantoj aron da novaj plibonigoj, kiujn vi espereble taksos valoraj:



Escriba una palabra

Buscar en las definiciones

© Todos los derechos reservados

Autor: **Fernando de Diego**

Coordinador: A. Valén

Revisores:

H. Alós, J. Camacho, M. Fernández, M. Gutiérrez

Equipo informático:

Federación Española de Esperanto

<https://www.esperanto.es>

info@esperanto.es



Agradecemos sus sugerencias para el diccionario en esperanto@esperanto.es

Ni antaŭdankas viajn sugestojn pri la vortaro ĉe esperanto@esperanto.es

- Korektika kaj aktualigita datumbazo kun ĉiuj originalaj trajtoj de la vortaro
- Aŭtomata sugesto de ebloj dum serĉado de vortoj en la hispana
- Prezento de vortoj similaj al tiu serĉata
- Eblo traserĉi ajnan vorton aŭ esprimon (en la du lingvoj) ene de la difinoj
- Virtuala klavaro kun esperantaj supersignitaj literoj kaj specialaj karaktroj de la hispana por faciligi la serĉadon per ĉiuj klavaroj
- Pli bela aspekto kaj pli intua kaj facila interfacio
- Adaptiĝo por telefonoj kaj tabletoj

Ni ŝatus ricevi viajn opiniojn, tiel ke ni povos iom post iom korekti eventualajn erarojn kaj plibonigi la programon. Vi povas kontakti la skipon ĉe esperanto@esperanto.es
La adreso de la vortaro daŭre restas la sama: <https://www.esperanto.es/diccionario>

Miguel Ángel Sancho



Fernando de Diego

PROJEKTO LORCA

Okaze de la kvindekjariĝo de la unua eldono en Esperanto de *Cigana romancaro (Romancero gitano)*, de Federico García Lorca, en traduko de Fernando de Diego; kaj de la okdekkvinjariĝo de la morto de la poeto, HEF planis omaĝi ambaŭ aŭtorojn per du ĉefaj agoj.

La unua, reeldoni bite la romancaron. Al la allogo de la verko mem, aldoniĝas la majstreca traduko de De Diego, kun interesega enkonduko en la verkon de la tradukinto. Menciindas ankaŭ la altkvalita eldonista laboro farita de Juan Régulo Pérez, kiu aperigis la verkon en la serio *Beletraj Kajeroj* de la kolekto *Stafeto*. Siatempe, William Auld verkis la antaŭparolon. Antaŭparolon por la dua bita eldono verkos Antonio Valén.

La dua ago estas eldoni papere antologion de poemoj de Lorca, en traduko de Miguel Fernández, kun aldona esearo de ĉi lasta pri la verkaro de la poeto. Antaŭparolon verkos Duncan Charters, nuna prezidanto de UEA, universitata profesoro kaj fakulo pri Lorca. Tiu triopo da nomoj estas garantio de intereso, belo kaj rigora laboro.

Ankaŭ flanka agado estas planita surbaze de tiuj du ĉefaj agoj: prezentado de la verkoj en niaj kongresoj (virtuale, ĉi-jare; ĉeeste en Comillas), prezentado de la verkoj en kulturaj institucioj, diskonigo de la novaj eldonaĵoj per artikoloj en esperantistaj medioj, diskonigo de la novaj eldonaĵoj ekster niaj medioj pere de gazetara komunikado, sendo de la bita eldonaĵo al la ĉefaj hispanaj bibliotekoj, kiuj konservas bitajn materialojn, kaj aliaj agoj ankoraŭ ne planitaj, kiuj eventuale montriĝos interesaj dum la disvolvo de la projekto.

Kiam la momento alvenos, la estraro ŝatus kalkuli je la helpo de la grupoj kaj/aŭ unuopulaj volontuloj por kunlabori en la prezentado kaj diskonigo de la verkoj je loka nivelo. Temas pri verkoj altkvalitaj ĉiusence kaj prezentindaj en kulturaj institucioj. Oni profitu ilin por agi ankaŭ loke.

La estraro.



75a DATREVENO DE LA MORTO DE JULIO MANGADA

La 14an de aprilo 2021 estis kunmemorita la 75a datreveno de la morto de unu el la plej elstaraj esperantistoj de la komenco de la 20a jarcento, dumlonge prezidanto de tiama Hispana Esperanto-Asocio, la fama militisto Julio Mangada Rosenörn. Pro tiu okazo, la retejo “Mondmilito”, kiu kolektas tekstojn rilatajn al la periodo ĉirkaŭ la Dua Mondmilito, en ampleksa teksto, publikigis portreton pri li, aŭtoritan de Toño del Barrio. Ĝi estas legebla ankaŭ en la retejo: <https://mondmilito.hypotheses.org/4320>.

RADIKALA ZAMENHOFA MILITISTO

Oni povus diri ke Julio Mangada (1877-1946) elektis la tagon de sia morto. La 14a de aprilo 1946 estis la 15a datreveno de la komenco de la Dua Hispana Respubliko, kaj do tiu tago estas tradicie la festo de la hispania respublikanismo. Sed la 14a de aprilo estis ankaŭ la tago de la morto (en 1917) de lia plej granda heroo kaj inspiro, la iniciatoro de Esperanto, D-ro Zamenhof. Ĉar ja eblas diri, kun nur iometa troigo, ke Mangada estis la plej respublikema el ĉiuj siaj kolegoj kaj la plej zamenhofa el ĉiuj esperantistoj en Hispanio.

Julio Mangada estis tre fama homo dum pluraj jaroj en la politika kaj militista historio de Hispanio, kaj ankaŭ ene de la esperantismo, sed la memoro pri li iom post iom malbriliĝis kaj distordiĝis.



Li estis unu el la lastaj reprezentantoj de la radikala alo de la deknaujarcenta liberalismo, kiu foje havis sian ĉefan apogon en la militistaro, sed kiu jam en la 20a jarcento estis perdinta grandan parton de sia forto.

Julio Mangada Rosenörn naskiĝis en 1877 en la urbo Sancti Spiritus, en la insulo Kubo, tiam ankoraŭ kolonio de la hispana monarkio, filo de profesia militisto kaj de virino el la kreola loĝantaro, devenanta de danlandaj kolonioj. En mallonga membriografia noto verkita en la fino de sia vivo li asertis ke jam infanaĝe li estis influita de la sendependigaj militoj. Post la vidviĝo de la paĉjo tiu ĉi revenis al Hispanio kaj reedziĝis. Laŭ la atestoj de la filo, la nova edzino estis fanatike katolika, kio lin multe suferigis.

Sekvante la familian tradicion, Mangada eniris la militistan karieron en la infanteria branĉo. Li mallonge partoprenis la finajn etapojn de la kuba sendependiga milito kaj poste daŭrigis sian karieron en diversaj deĵoroj. Li ankaŭ partoprenis la nordmarokajn militkampanjojn, sed oni ne povas lin konsideri membro de la t.n. afrikanismaj rondoj, de militistaj veteranoj en tiu milito, kiuj tiom influaj estis poste en la respublikana etapo kaj speciale en la ribelula flanko de la civila milito.

En la komenco de la jarcentŝanĝo li komencis rilati kun politike kaj socie radikalaj rondoj, kaj speciale kun la du movadoj kiuj plej influis lian postan disvolviĝon: framasonaro kaj Esperanto.

Li eniris la framasonaron en 1906 en la loĝio Progreso. La framasonaro en Hispanio estis ege influa en tiu momento en la liberala pensmaniero, kreis la etoson por ensociiĝo de parto de la etburĝaro, formis la ĉefan kolonon kontraŭ la influo de la katolika Eklezio en la socia vivo. Ĝi estis sufiĉe disvastigata en la militistaj rondoj, ne nepre en la radikalaj, kio je la fino estis unu el la kaŭzoj de la persekutoj suferitaj post la venko de la generalo Franco, ĝia malkaŝa malamiko. Mangada estis konstanta kaj aktiva membro, kun gravaj rilatoj en ĝia sino, kie li atingis la 33an gradon. Li kontribuis al framasonaj revuoj, verkis librojn pri framasonismo kaj restis ligita al ĝi eĉ dum sia ekzilo.

Li ankaŭ multe rilatis al aliaj rilataj movadoj, kiel teozofio, naturismo, vegetarismo, kaj similaj, kio donis al li famon de ekstravaganca homo.

Ankaŭ en 1906 li konatiĝis kun Esperanto kaj ĝin tuj lernis. Li estis klare influita de la ideologia flanko de la lingvo, kiun li iel ligis kun siaj framasonaj kaj universalistaj ideoj. Li propagandis la lingvon en framasonaj gazetoj kaj kreis specifan revuon de tiu tendenco, kune kun du amikoj kun kiuj li ofte kunlaboris de tiu momento, Fernando Redondo Ituarte (1882-1949), ankaŭ militisto kaj Emilio González Linera, presisto. La triopo estis la eldonistoj de la Deklaracio pri Homaranismo de Zamenhof, en momento kiam la ĉefaj okcidenteŭropaj gvidantoj oponis liajn kvazaŭreligiajn proponojn, kiuj ilin embarasis.

La idearo de Mangada kaj liaj kolegoj estis tute kongrua kun Homaranismo, kaj ili zorgis pri la presado kaj distribuado de tiu manifesto, el loko kiu en tiu momento ŝajnis sufiĉe marĝena al la ĉefa fluo de la organizita esperantismo.

Post krizo en la organizita E-movado en Hispanio ĉirkaŭ la Unua Mondmilito, li fondis en 1917 la Zamenhofan Federacion kaj iom poste la Hispanan Esperanto-Asocion. Li estis la prezidanto, ĉefa animanto de tiu asocio dum la sekvaj jaroj, tiel ke li fariĝis sendube la ĉefa proparolanto de la esperantista movado en Hispanio dum la 1920aj kaj 1930aj jaroj. Li aktivis en multaj kampoj: propagandis, varbis, instruis, verkis, tradukis, organizis.

Lia aktivado ne estis ĉiam glata. Li ofte konfliktis kun aliaj esperantistoj, kiuj ne akceptis liajn aŭtoritatecajn sintenojn kaj lian insiston pri centraligita kaj pure esperantisma organizaĵo. Speciale akra estis lia kunpuŝiĝo kun la katalunisma movado, kie ne mankis malpuraj incidentoj, kaŭzitaĵ de lia jakobenisma idearo. Aliflanke, li ne hezitis kunlabori kun esperantistoj de plej diversaj ideologioj, kio surprizas, kiam ni konsideras la postan politikan dividon kondukantan al kruela milito.

Liaj politikaj ideoj kaŭzis al li konstantajn ĉikanojn, jam de la unuaj momentoj. En 1917 li suferis areston defendinte la laboristajn gvidantojn en ĝenerala striko. En la 20aj jaroj li oponis la diktatorecon de generalo Primo de Rivera (1870-1930). Unu el la lastaj kaj plej famaj klopodoj kontraŭ la monarkio, en 1930, estis gvidata de liaj subuloj kaj kolegoj, kiuj fariĝis martiroj de la respublikanoj, kvankam la rolo de Mangada mem ne sufiĉe klaras pro tiutempaj personaj cirkonstancoj. La proklamon de la respubliko la 14an de aprilo 1931 li travivis en malliberejo, kaj li akceptis la novan reĝimon evidente kun entuziasmo. Li multe aktivis en respublikanaj rondoj. Unu lia agado defende de la novaj institucioj, ankoraŭ malfortaj, kondukis en 1932 al la t.n. “Incidento de Carabanchel” (Karabanĉelo, kazerno en apudmadrida urbeto nun kvartalo), kiu kunpuŝis lin al reakciaj superuloj. Lia aresto kondukis al tutlanda apoga kampanjo, kiu donis al li eksterordinaran famon, kaj faris el li simbolon de la nova reĝimo. Li plu aktivis en tiaj rondoj dum la sekvaj jaroj, ĉefe post sia retiriĝo el la armeo.

Je la komenco de la Hispana Milito, en julio 1936, li tuj revenis al la militista agado, kaj estante klare respublikema homo, neniel dubinda, gvidis trupojn kiuj helpis sufoki la ribelon en la madridaj kazernoj.

Li tuj organizis improvizitajn taĉmentojn de milicianoj, plejparte devenantaj el socialismaj rondoj kaj sindikatoj, kun kiuj li eliris Madridon por alfronti la ribelajn trupojn venantajn el norda Kastilio. Tiu estis la tiel nomata “Kolono Mangada”, kiu baldaŭ tre famiĝis pro siaj unuaj sukcesoj en la teritorioj nordokcidente de la madrida (guadarama) montaro, kiuj haltigis la marŝon de la malamikaj trupoj alvenintaj por konkeri la ĉefurbon.

Tiuj unuaj sukcesoj, modestaj sed sufiĉe gravaj en la kunteksto de la unuaj etapoj de la milito, donis al li grandegan famon kaj prestiĝon. Li ricevis multajn honorojn, kaj liaj trupoj nomis lin generalo, kvankam la registaro havigis al li nur la oficialan rangon de kolonelo. De tiam li estis kromnomata “la popola generalo”.

PRINCIPAL
SERVICIO DE MIGRACION

FORMA B.

NUM. 185032

TARJETA DE IDENTIFICACION EXPEDIDA POR EL DEPARTAMENTO DE MIGRACION EN MEXICO, D.F.

A. JULIO MANGADA ROSENBERG

EL CUYO RETRATO Y FIRMA CONSTAN EN SEGUIDA



MEDIA FILIACION DEL INTERESADO

ESTATURA: 1.70 PESO: 65 OJOS: Marrones DE CADENA: ...

COLOR: blanco PIEL: castaño

CEJAS: negras OJOS: marrones

NADIE: De USA LUGAR DE NACIMIENTO: ...

BISABUELO: ... PAIS DE ORIGEN: ...

SEÑAS PARTICULARES: ...

ESTADO COMPLEMENTARIOS

AÑO EN QUE NACIÓ: ... ESTADO CIVIL: casado

PROFESION, OFICIO O OCUPACION: ... LENGUA: español

OTROS NOMBRES QUE LLEVA: ... IDIOMA NATIVO: ...

LUGAR DE NACIMIENTO: Sancti-Spiritus (Cuba)

NACIONALIDAD ACTUAL: ESPAÑOLA

RELIGION: ... RAZA: blanca

RECIBIDA EN MEXICO, D.F. EL (16-XII-1941)

RECONOCIDA POR LA COMA DE MIG. EN VERACRUZ EL 14-2-42 COMO INDEBENTADO ASISTENTE TECNICO POR UN AÑO RESPONSABLE.

RECONOCIDA POR EL PRIMER Y SEGUNDO COMANDO EN JEFE EN ESTA MISMA CALIDAD A PARTIR DEL 16 DE DIC. DE 1942.-VENCE EN EL 16 DE DIC. DE 1944.-OF. 23717 de

F.P.O. DEL DEPARTAMENTO DE MIGRACION EN MEXICO, D.F.

FIRMA DEL COMISARIO GENERAL DE MIGRACION: ...

Tamen, liaj sekvantoj, tute improvizitaj, ne bone organizitaj kaj sen vera militista trejnado, sufiĉe maldisciplinemaj, ne rezistis la puŝon kiam en septembro atingis la areon la trupoj komanditaj de generalo Franco, konsistantaj el profesiaj legionuloj kaj maŭraj dungosoldatoj. La Kolono Mangada suferis rapidajn malvenkojn, kaj Mangada mem, jam sufiĉe maljuna, estis retirita el la gvidado,

kaj destinata al ariergardaj taskoj.

Fine de la milito li sukcesis eniri la lastan grandan ŝipon elirantan el la haveno de Alikanto en marto 1939, la “Stanbrook”, kaj eskapi al Alĝerio. De tie, danke al la demarŝoj de la tutmondaj esperantistoj, li moviĝis al Meksikio, kie li integriĝis en la ekzilitajn rondojn. Jam sufiĉe malsana, li forpasis, kiel dirite, en 1946.

La kazo de Mangada bone ilustras la kompleksecon de la idearo de la militistaro en Hispanio. Nun oni emas vidi tiun institucion kiel la plej bazan reprezentanton de konservatismo kaj la apogon de tradicio. Tio estas des pli helpata pro esprimoj priskribantaj la civilan militon kiel la “ribelon de la armeo”. Konsiderante la ribelan flankon oni ofte tro enfokusigas la gvidintajn komandantojn. Sed fakte dum la deknaŭa jarcento la militistaro estis unu el la ĉefaj fortoj en la modernigo de la lando, en la lukto kontraŭ la reakcio, kaj specife kontraŭ la povo de la aristokratio kaj la katolika eklezio, cetere en fenomeno tre konata en aliaj landoj en similaj procezoj en la pasinto kaj eĉ nuntempe. Jam laŭlonge de la fino de la deknaŭa kaj komenco de la dudeka jarcentoj oni povas konstati procezon de dekstriĝo kaj konservativismo en la militistaro, sed ankoraŭ en la jardekoj de la 1920aj kaj 1930aj ekzistis tre granda pluraleco en la politikaj, ideaj kaj sociaj vidpunktoj de tiu kolektivo.

Kiam eksplodis la milito la armeo forte dividiĝis. Multaj militistoj restis fidelaj al la respublika registaro, ĉu pro ideaj motivoj, ĉu pro sento de devo al la legitima povo, ĉu simple pro la hazardo de la cirkonstancoj en kiuj ili sin trovis en tiu preciza momento. Ne estas sufiĉe konate ke estis pli da generaloj kiuj restis en la respublikana flanko ol tiuj kiuj ribelis kontraŭ la reĝimo, kvankam en la pli malsupraj kaj junaj rangoj la proporcio estis tamen multe pli granda en la flanko de la ribeluloj.

Granda kvanto da militistoj estis membroj de la Framasonaro. Tiu ĉi institucio arigis signifan parton de la progresema mezaj klasoj, kiuj pledis por modernigo de la lando kaj kontraŭis la tradiciajn instituciojn.

La rolo de la framasonoj en la armeo tute agacis iujn sociajn tavolojn, ĉefe ligitajn al katolikismo. Specialan malamon montris generalo Franco, kiu eĉ verkis libron kontraŭ ĝi, kaj kiu jam dum la milito starigis specialan Tribunalon “kontraŭ Framasonaro kaj Komunismo”, kun la celo elradikigi ambaŭ movadojn en la lando. Koncerne framasonaron li tute sukcesis, kaj per mortkondamnoj, ekzilingoj aŭ longaj prizonpunoj oni neniigis la framasonan organizadon en la tuta lando, praktike ĝis la nuna tempo. Mangada mem ricevis punon de 30 jaroj da prizono, eĉ se li tiam troviĝis sekure en ekzilo.

Mangada estis unu el la plej klaraj ekzemploj de tiu influo de la framasonaro, sed ne nepre la plej signifa, ĉar lia radikalismo distingis lin de pli moderaj tavoloj.

Ion saman, kvankam klare malpli signifan, oni povus diri pri esperantismo. Karakteriza trajto de la esperanta movado en Hispanio (eĉ se ĝi ne estis ekskluziva al ĝi), estis la relativa abundo de militistoj inter la esperantistaro, eĉ en gvidaj roloj aŭ en kulturaj iniciatoj kiel la verkado kaj tradukado. Eble ilia deveno el mezaj klasoj, emo al socia kresko, kontaktebleco kun eksterlando aŭ simple tiu modere progresema ideo aldiris ilin al esperantismo. Denove Mangada elstaris pro sia radikalismo kaj ideologiemo, sed li ne estis sola en tiu strebo.

José Antonio del Barrio

Fontoj kaj referencoj:

José Antonio del Barrio, « Julio Mangada Rosenörn », en Javier García Fernández (ed.), *25 militares de la República*, Ministerio de Defensa, Madrid, 2011; 2019.

José Antonio del Barrio: “Julio Mangada Rosenörn, la antonomazia esperantisto”. Prelego dum la Hispana Esperanto-Kongreso de la jaro 2003 (Valencio). <http://delbarrio.eu/mangadauni.htm>

Julio Mangada Rosenörn. “Koran dankon!” *Renovigo*, 01/1942.

Ramón Salas Larrazábal, *Historia del Ejército Popular de la República*, Madrid, La Esfera de los libros, 2006.

Julián Zugazagoitia, *Guerra y vicisitudes de los españoles*, Tusquets, Barcelono, 2001.

José Antonio del Barrio kaj Ulrich Lins, “La utilización del esperanto durante la guerra civil española”, Komuniko prezentita en internacia scienca Kongreso pri la hispana intercivitana milito (Madrido, 27-29/11/2006).

Jukio Hirai, *Hispana, Kataluna, Mangada – verkoj de Dil Avia*, eldonejo Riveroj, Oosako, 2003.

Antonio Marco Botella, “Vivo kaj verkaro de Julio Mangada Rosenörn (1877-1946)”, en *Klaro kaj elasto. Fest-libro por la 80a naskiĝtago de Fernando de Diego*, Irm kaj Reinhard Hauptenthal red., Schliengen, 2003, p. 243-271.

Bildoj: Centro Documental de la Memoria Histórica, Salamanca, Fondo Mangada

NEKROLOGE

Forpasis Albertus Navarro

Lige kun la SAT-kongreso okazinta en Barcelono somere de 2019, oni petis al ni instrui Esperanton en loka kultura asocio. Tiel ĉe Liberecana Ateneo de Gràcia kreiĝis nova grupo de entuziasmuloj, kiuj multe aktivis ĝis la alveno de la pandemio. Oni korespondis kun eksterlandanoj kaj eĉ organizis eventojn.

Unu el la plej aktivaj membroj de la grupo estis Albertus. Li ŝategis la internacian lingvon kaj ankaŭ la movadon. Fakte, jam dum la preparado de la kongreso li helpis nin, ĉar li havis la kontakton de bus-agentejo, kiu faris al ni favoran prezon por la kongresaj ekskursoj. Li konis ĝin ĉar dum pli ol du jardekoj li partoprenis la turneojn de la hispana muzikgrupo Mojinos Escozíos.

Profesia son-teknikisto kaj muzikologo, li kutimis turnei ankaŭ kun aliaj konataj grupoj, kiel Los Rebeldes. Kaj dum pli ol 25 jaroj li laboris kiel son-teknikisto en la fama barcelona koncertejo Sala Bikini.

Kiam la kurso komenciĝis li baldaŭ ekkorespondis Esperante kun usona muzikisto, kun kiu li pasie dividis ankaŭ liberecanan sintenon pri la vivo, kaj historian intereson pri la Hispana milito (1936-39). Albertus estis afabla, amuza, karisma, kunlaborema, engaĝinta kaj sindonema amiko.

Suferinte la kruelan kraban mordon antaŭ kelkaj monatoj, la redukton de la socia vivo dum la pandemio li alfrontis kun rezigno sed ankaŭ kun espero. Bedaŭrinde ni devas informi pri lia forpaso.

La tero estu al vi malpeza, kara Albertus!

Xavi Alcalde



LA STRANGA ANGULO

Skribas Viko

Ĉapitro 1. Kiel sukcese stultigi gefilojn.

Saluton, samlingvano.

Mi preskaŭ pardonpetas vin. Sed tion mi ne faros. Ne faros ĉar mi pensas, ke pensi ne estas eraro. Pensi estas tio, kio okazas en onia cerbo, kiam oni ne ripetantas la samaĵojn, kiuj jam estis diritaj de aliaj. Mi ne ripetas. Mi pensas. Tio ne signifas, ke la enhavo legindas.

Jen la unua teksto, kiu temas pri disvastigita scio, pri kio neniu ankoraŭ kuraĝis skribi, sed mi nun faras, danke ne al mia inteligento, tute normala statistike kutima, sed al mia nekapablo haltigi la skribemajn fingrojn. Temas pri, kiel sukcese stultigi viajn gefilojn. Se ili jam sufiĉe aĝas, mi bedaŭras, ke vi jam ne havas eblon profiti de ĉi tiu valorinda teksto. Sed se ili ankoraŭ ne naskiĝis aŭ ĵus tion faris, gratulon! Vi povas plibonigi la kutiman kapablon atingi, ke viaj gefiloj estos malfeliĉaj stultuloj. Zorgeme legu. Se vi estas kutima nuntempa leganto, kiu al kutimiĝis al sociaj virtualaj retoj, duonon el la vortoj vi ne legos. Klopodu esti malnova leganto, tiu kiu ĉion konscie legis, eĉ pripensis (mankas muziko, kiu akompanintus tian sopiratan vorton, pripensi).

Unua konsilo. Vi agu kvazaŭ via filo aŭ filino (ekde nun *GF*) ne havus kapablon pensi, decidi aŭ atingi scion. Pro tio, ĉiam kiam *GF* decidu ion, vi rapide aldonu iun ajn esprimon, kiu signifas "Vi ne decidis tion, sed mi". Ekzemple, se *GF* prenas kuleron kaj metas ĝin en la ĝustan skatolon, vi diru "Jes! Metu ĝin tien!" Tio atingos, ke *GF* sentu, ke ne decidis, ĉar ne kapablas, sed vi.

Konsilo dua. Senhalte komparu malpozitive. Se vi ambaŭ estas ekzemple en infana parko, vi profitu de ĉiu situacio, kiam alia infano faras ion, kion via ne kapablas aŭ ne deziras fari. Vi diru ekzemple "Rigardu! Tiu infano bone faras tion, ne same kiel vi!". Tia aserto estas tiom potenĉava, ke vi detruos la memfidon de *GF* dum jaroj.

Konsilo tria. Detruu la *GF*-liberecon. Ĉar vi jam plenkreskulas, vi tute ne liberas. Tio estas tiom sukcesa atingo, ke vi ne kapablas pensi meti kuleron en la biciklan sakon, aŭ litotukon en la salonan ŝrankon. Via *GF* ankoraŭ liberas. Do vi ankoraŭ povas sperti, ke li aŭ ŝi metas forkon en lavmaŝinon. Vi ne lasu, ke tio okazos. Vi ĉiam montru, ke tio estas gravega eraro. Ĉiu aĝo havas unu lokon kaj nur ĝin. Vi diru "Ne! Eraro! La ĉemizon devas eniri en la ŝrankon por ĉemizoj! Ne! La telero ne estas ludilo sed manĝilo. La ludiloj estas tiuj, kiuj estas en la ludilujoj!" "Ne! Nun estas la horo dormi, la horo vekigi, la horo manĝi, la horo iri al lernejo, la horo iri straten, la horo telefoni geavojn, la tago ripozi, la momento spekti filmon...!" Via *GF* ankoraŭ erare pensas, ke oni povas decidi kiel fari kiam kie. Ho! Granda damaĝo! Vi urĝe rapide korektu tion.

Kvara konsilo. Gravas enmeti en ĝin la principon "Ni, la homoj, ĉiam survoje estas". Ĉar vi plenkreskulas, vi surstratas ĉar vi ĉiam irantas. Sed infanoj ankoraŭ sentas, ke ili estas nun kaj ĉi tie. Ili ankoraŭ sentas, ke ili meritas ĝui tion, kio nun okazas. Ili ankoraŭ ne lernis, ke ni, la plenkreskuloj, ĉiam estas survoje por atingi ion. Ekzemple, vi diris al GF "Feliĉiĝu! Hodiaŭ ni piediros al parko" Gf ĝoje ricevos tiun novaĵon. Sed kiam li aŭ ŝi surstratos facile forgesos la celon kaj lasos sin ĝuante la pordojn de konstruaĵo, la ŝtonetojn sur la trotuaro, la hundojn piedirantajn... Kaj diros vin "Rigardu! Kiom bela balkono!". Vi instruu, ke la vivo ne estas esti, sed iri. Kien? Ne gravas! Ni, plenkreskuloj ĉiam irantas.

Konsilo kvina. GF devas klare sendube akcepti, ke nenias. Nun la gravulo estas vi. Poste estos aliaj, kiel politikisto, pastro, verkisto... Gravas lerni tion kiel plej eble frue. Iom ligata estas la...

Sesa konsilo. GF sentu, ke oni devas ĉiam sekvi alian. Tiuj povas esti la ĉefo de la laboro, la pastro de la preĝejo, la prezidanto de la politika partio, la kantisto de la muzikgrupo, la verkisto de la preferataj romanoj, la urbestro, la fama piedpilkisto, la plej admirata membro el la grupo... Oni neniam povas esti sia propra gvidanto.

Konsilo sepa. Gravegas lernigi, ke ĉio jam dirlitis, ke nenio novas sub la suno. Pretiĝu, ĉar ĉi tiu konsilo estas malfacilega. Infanoj naskiĝas tro konfuzaj, sentante, ke ili meritas proponi ion novan. Tia defio bezonas tiom da peno, ke vi ne sufiĉos. Sed ne maltrankviliĝu. Ĉio ĉirkaŭanta helpas vin sukcesi. Plej eble, la sukceso alvenos kiam li aŭ ŝi jam estos junulo. Tiam vi laboru kune kun la edukada kaj socia sistemo, tiel ke li aŭ ŝi sentu, ke tiam estas la momento male fari, nome esti kreativa. GF jam tiam ne kapablos kreative pensi, havi verajn novajn ideojn, ĉar tia malsano jam estos forĵetita el la animo. Sed tiam estos momento, por ke li aŭ ŝi sentu, ke proponas ion novan, kvankam tio ne veros, ĉar tio pensita estos nur versio de kutimaĵoj.

Oka konsilo. Eble estas la plej malfacila. Sed vi ne izolas. Temas pri atingo de samtempaj nekoheraj malaj rezultoj. Unuflanke temas pri senti kaj pensi, ke oni klare scias, ke la mondo estas tute nekomprenebla, ke oni estas malforta kaj malsufiĉa por atingi scion pri la funkciado de la mondo. Aliflanke temas pri senti, ke oni tute bone komprenas la mondon, danke al asertoj, kiujn oni povas atingi en la superbazaro de la asertoj akceptitaj de la hegemonio. Ekzemple, oni ne komprenas tion, kio okazas en konkreta lando. Samtempe, oni akceptas aserton laŭ kiu, la loĝantoj de tiu lando estas preskaŭ simioj sen evoluigaj cerboj, kaj ke ni, la evoluigaj, meritas invadi tiun landon, mortigi loĝantojn, registraron ktp kaj starigi novan sistemon, kiu hazarde plibonigas la bankokonton de niaj ĉefuloj. Aŭ oni asertas, ke televido ĉiam mensogas, kaj samtempe ripetatas la novaĵojn spektitajn en la televidilo kvazaŭ nediskuteblajn veraĵojn. Vi ne bezonos tro da peno. Simple vi lasu vin spontanee reagi, spektante televidilon aŭ parolante en trinkejo post du bieroj. GF lernos danke al via ekzemplo.

Konsilo naŭa. Ili devas ŝajni mortuloj. Rimarku, ke kiam infano sidas statue aŭ ŝtone, kvazaŭ morta, la plenkreskuloj ĉirkaŭataj ĝoje asertas "Ho! Kiom bonas via GF!" Se li

aŭ ŝi moviĝas, havas ideojn, kuras, tuŝas, iel kondutas... la rezulto estas aŭskulti "Ho! Kiom da problemoj! Ni ne povas ripozi nek esti en paco!" Kelkfoje ŝajnas, ke gepatroj atendis pupon, ne GF-n.

Deka konsilo. Infanoj ne havas rajton. Plenkreskuloj rajtas tuŝi ilin, premi la kapon, damaĝi la nazon, ordoni paroli... Se plenkreskulo demandas al infano "Kiu estas via nomo?" kaj infano ne respondas post unu sekundo, la plenkreskula reago estas "Kio okazas? Ĉu kato manĝis vian langon?" Kompreneble infano ne rajtas decidi ne respondi. Ne rajtas havi sian propran konkludon pri la situacio. Li aŭ ŝi ĉiam devas ridegi kaj sciigi plenkreskulojn, ke la infana nazo ne havas kapablon senti doloron. GF devas akcepti, ke kvankam plenkreskuloj neniam neniel akceptos esti traktitaj same kiel ili traktas infanojn, infanoj devas feliĉe nature facile akcepti ĉion.

Mi haltos nun. Pluraj konsiloj atendas. Sed dek jam sufiĉas por doni al vi sintenton pri, kiel eduki gefilojn ĝis atingi, ke ili ne havos cerbon kaj perdos memfidon kaj kapablon esti liberaj. Vi estas sukceso de ĉi tiu metodo. Do, lasu vin natura tiel, ke vi atingos verajn stultajn gefilojn sukcese malproksimigitaj de la libera esto. Memoru: ili scias nenion, vi ĉion. Ili ĉiam eraras, vi pravas. Ili neniam decidas, sed sekvas vin.

Eble ni renkontiĝos poste. Ĝis tiam, restu feliĉa, justa, scivolema kaj bonkora sen limo.



FERVOJO SUBMARA INTER EŬROPO KAJ AFRIKO

La ideo unuigi Eŭropon kaj Afrikon pere de ponto aŭ tunelo en la Ĝibraltara mar-kolo estas revo de antaŭ multaj jarcentoj. Tamen la apero de fervojo en la 19-a jarcento antaŭenigis tiun projekton pere de tiu unua propono de la franca Charles de Villedeuil en la jaro 1869. Tiam, kaj ankaŭ okaze de postaj projektoj de la jaroj 1906, 1919 kaj 1929, oni asertis, ke la plej taŭga projekto estus la konstruo de submara tunelo, pro la fakto ke la starigo de ponto kaŭzus gravajn problemojn al la senĉensa ŝip-trafiko ĉe la mar-kolo.

Fine de la 7-a jardeko pasintjarcente, Hispanio kaj Maroko ambaŭ ŝtatoj akordis krei komitatojn por pristudi la eblon konstrui tiun tunelon. Fine la projekto pleje realigebla estis krei tunelon kun ekstretoj en la maroka kabo *Malabata* apud Tanĝero kaj kabo *Paloma* proksime al Tarifo en Hispanio. Ne temas pri la plej mallonga distanco, entute ĝi estus 28 kilometroj, anstataŭ tiuj 14 kiu estas la plej mallonga distanco inter Eŭropo kaj Afriko, tamen la mar-profundo en tiu linio estas apenaŭ 300 metroj.

Ĉi tiu submara tunelo ne estus la unua konstruita en la mondo, jam ekzistas aliaj por komuniki Francion kaj Brition en la Manika Mar-kolo, same en Japanio troviĝas la tunelo *Seikan*. Tamen en ĉi tiuj lastaj tuneloj la mar-profundo ne estas tiel granda kiel en Ĝibraltaro, ekzemple en la Manika Mar-kolo la tunelo troviĝas nur je 174 metroj. Estas necese diri, ke la mar-premo pligrandiĝas laŭ la profundo, kaj tio sendube malfaciligas la konstruon de tunelo.



Submara fervoja tunelo ĉe la Ĝibraltara Mar-kolo



Mapo de la realigebla submara tunelo inter Eŭropo kaj Afriko

La tunelo etendiĝos tra 38,7 kilometroj, el tiuj, 27,7 kuŝas sub la maro. Oni konstruos tri galeriojn, du por fervojoj, kun distanco 60 metroj inter ili, kaj la alia meze situita, kiel servo-galerio. Ĉiu 340 metroj ekzistos transversa koridoro por komuniki tiujn tri galeriojn.

Oni konstruos ankaŭ 2 stacidomojn en ĉiu ekstremo de la tunelo kaj tie estos eble en-trajniĝi aŭtomobilojn kaj kamionojn. La trajnoj povos atingi 120 km/h kaj supozeble la vojaĝo daŭros 30 minutojn. Rilate la trajnojn, oni pripensis uzi specialan trajnon por transporti aŭtomobilojn, kaj alia pli longa por kamionoj kaj aŭtobusoj. Verŝajne la trajno longiĝos ĝis 700 metroj.


Kiam la tuneloj estos konstruitaj? Nu, Hispanio kaj Maroko jam eklaboris por redakti teknikajn studojn. En la jaro 2003 ambaŭ ŝtatoj jam akordis pri teknikaj aspektoj kaj oni kreis du organismojn por ekigi la projekton. En Tarifo (Hispanio) oni traboris kelkajn zonojn por esplori tiean grundon. Poste, en la jaro 2006, svisa kompanio proponis sin por realigi la projekton. Tamen, pro la malfacilaj geologiaj kondiĉoj, ĉar temas pri zono kie abundas tertremoj, estos necesaj 15 jaroj por realigi la konstruon de la tunelo. Do, ne temas pri konstruo baldaŭ konstruota.



Hispanaj Amikoj de Fervojistoj Esperantistaj

!om da matematiko (2) ...

La metodo d'Hondt por balotoj en Hispanujo. Ĉu maljusta?



La tiel nomata “metodo d'Hondt” estas tiu ĝenerale uzata en Hispanujo por distribui la elektontaj reprezentantoj inter la diversaj listoj, kiuj kandidatas al iu ajn institucio: Parlamentoj nacia kaj regionaj, Urbodomoj, sindikataj reprezentantoj en entreprenoj, ktp. Ĝi estis elpensata de Victor d'Hondt (1841-1901), belga juristo kaj matematikisto.

Ĝia funkciado estas sufiĉe simpla: Ni imagu ke oni devas elekti 10 reprezentantojn kaj ke kandidatas 4 listoj, kiujn ni nomos A, B, C kaj Ĉ kaj ni imagu ke ĉiu listo poe ricevas la jenajn voĉdonojn:

A	423 voĉd.
B	1.032 voĉd.
C	125 voĉd.
Ĉ	673 voĉd.

La sekva paŝo estas ordigi la listojn laŭ la voĉdonoj ricevitaj. Poste, oni dividas la numerojn per 1, 2, 3, 4, ktp. Post ĉiu el tiuj dividoj, oni donas unu reprezentanton al la listo kiu portas la plej altan numeron. Jen:

LISTO	VOĈDONOJ	DIVIDO PER 2	DIVIDO PER 3	DIVIDO PER 4	DIVIDO PER 5
B	1032 (1)	516 (3)	344 (5)	258 (7)	206 (10)
Ĉ	673 (2)	336 (6)	224 (8)	168	
A	423 (4)	211 (9)	141		
C	125				

- Divido per 1 → Unua reprezentanto al la listo B (1032). Ni dividas tiun numeron per 2: 516
- Plej granda numero: 673. Dua reprezentanto al la listo Ĉ. Ni dividas tiun numeron per 2: 336
- Plej granda numero: 516. Tria reprezentanto al la listo B. Ni dividas la voĉdonojn de B per 3: 344
- Plej granda numero: 423. Kvara reprezentanto al la listo A. Ni dividas la voĉdonojn de A per 2: 211
- Plej granda numero: 344. Kvina reprezentanto al la listo B. Ni dividas la voĉdonojn de B per 4: 258
- Plej granda numero: 336. Sesa reprezentanto al la listo Ĉ. Ni dividas la voĉdonojn de Ĉ per 3: 224
- Plej granda numero: 258. Sepa reprezentanto al la listo B. Ni dividas la voĉdonojn de B per 5: 206
- Plej granda numero: 224. Oka reprezentanto al la listo Ĉ. Ni dividas la voĉdonojn de Ĉ per 4: 168
- Plej granda numero: 211. Naŭa reprezentanto al la listo A. Ni dividas la voĉdonojn de A per 3: 141
- Plej granda numero: 206. Deka reprezentanto al la listo B.

Resume:

Listo B: 5 reprezentantoj
Listo Ĉ: 3 reprezentantoj
Listo A: 2 reprezentantoj
Listo Ĉ: 0 reprezentantoj

La “metodo d’Hondt” klare favoras al la listoj, kiuj ricevas pli da voĉdonoj kaj, sekve, en Hispanujo, la malgrandaj partioj ofte plendas pri ĝia maljusteco kaj pledas pri pli proporcia sistemo. Ĉu ili pravas kiam plendas? Ni vidu:

En la antaŭa ekzemplo ni povas fari pure proporcian disdividon de la 10 reprezentantoj. Jen la rezulto:

Sumo de la voĉdonoj: 2253. Elektendaj reprezentantoj: 10.

Listo B: $1032 \times (10/2253) = 4,580 \rightarrow 5$ reprezentantoj
Listo Ĉ: $673 \times (10/2253) = 2,987 \rightarrow 3$ reprezentantoj
Listo A: $423 \times (10/2253) = 1,877 \rightarrow 2$ reprezentantoj
Listo C: $125 \times (10/2253) = 0,554 \rightarrow 0$ reprezentantoj

Estas la sama disdivido de la reprezentantoj inter la diversaj listoj. Komprenble, kelkaj voĉdonoj “perdiĝas” en la disdivido sed tio estas neevitebla: ĉiu reprezentanto estas homo, do unuo netranĉebla.

Nu, kiam la malgrandaj partioj plendas, ili ne devus plendi pri la Sro. D’Hondt. Al kio do plendi? Certe al la disdivido de la lando laŭ provincoj kaj la fakto ke ĉiu provinco iĝas teritorio, kie oni elektas homojn. En ĉiu provinco la malgrandaj partioj “malutiligas” voĉdonojn ĉar la ricevitaj ne sufiĉas por atingi reprezentanton.

Ĉu estas solvo por tio? Ni donu eventualan (eble tro simplan) solvon al tiu problemo de maljusta asigno de reprezentantoj al la diversaj listoj: plu konservi la nunan sistemon sed kun aldono de pliaj reprezentantoj, proporcie elektitaj laŭ la voĉdonoj atingitaj naskale de la diversaj listoj. Fakte, tio ne estus strangaĵo en Hispanujo: dum la dua respubliko (1931-1939) ja oni uzis metodon tian. Malavantaĵo: la regionaj partioj estus damaĝitaj kaj la grandaj naciaj partioj estus favorataj. Sed, ĉu tio estus “malavantaĵo”? Tio dependas de personaj politikaj inklinoj.

Jesús M. García Iturriz
jmgiaa@hotmail.com



Datos personales

POR FAVOR, ESCRIBA EN MAYÚSCULAS.

Nombre:		Solo para renovaciones	
Apellidos:		Nº socio:	
Dirección:		Código postal:	
Localidad:		Provincia/Región/País	
Teléfono(s)		DNI/Pasaporte:	
Correo electrónico:		Fecha de nacimiento:	

Categoría de socio

Marque con una X la categoría elegida:

Categorías		Euros	X
OM	Socio individual, cuota ordinaria	32	
RM	Socio individual, cuota sin papel; recibe Boletín sólo en formato electrónico *	30	
SM	Cuota reducida: parados o situaciones especiales **	20	
JM	Cuota reducida: jóvenes (< 30 años) ***	20/10	
PM	Socio protector	64	
KM	Socio colectivo ****	64	

(*) Cuota para socios que no desean recibir el Boletín en formato papel y prefieren recibir todas las comunicaciones sólo por medios electrónicos.

(**) Cuota especial para desempleados u otras personas con dificultades económicas; consultar con la directiva para discutir los detalles.

(***) Los menores de 30 años son miembros automáticos de la sección juvenil. Si además son miembros de un club o asociación, miembro colectivo de la Federación, pagan la mitad de la cuota reducida.

(****) No pagan cuota los socios colectivos con menos de 10 miembros, dos de los cuales sean socios individuales de la Federación.

Todos los socios reciben la publicación Boletín (4 números al año). Todas las cuotas reducidas reciben el Boletín sólo en versión electrónica

Forma de pago:

- Domiciliación bancaria (cumplimente y envíenos el impreso adjunto).
- Ingreso en las cuentas de la Federación (adjunte comprobante).
 - TRIODOS BANK: ES24 1491 0001 2420 0926 4025
 - BBVA: ES85 0182 1252 3102 0401 1961.
- Ingreso en la cuenta hefb-m de Universala Esperanto-Asocio (adjunte comprobante).
- Pago por Paypal, en la cuenta admin@esperanto.es.
- Pago en efectivo en la oficina de la asociación.

Fecha:

Firma:

NOTA LEGAL:

En virtud de lo dispuesto en el Reglamento (UE) 2016/679 del Parlamento europeo y del consejo de 27 de abril de 2016, relativo a la protección de las personas físicas en lo que respecta al tratamiento de datos personales, la FEDERACIÓN ESPAÑOLA DE ESPERANTO le informa de que sus datos personales incorporados en este formulario serán incluidos en un fichero creado bajo nuestra responsabilidad, cuyo uso es exclusivamente para gestiones internas propias de la FEE, así como para el envío de publicaciones e informaciones relacionadas con el esperanto. Con la firma de este documento, consiente expresamente este uso de sus datos. Le informamos además, que la FEE no cederá estos datos a terceros salvo lo que marque la ley en materia de información a las Administraciones Públicas, y que puede ejercer sus derechos de acceso, rectificación, cancelación y/u oposición, previstos en la citada normativa, dirigiendo un escrito a FEDERACIÓN ESPAÑOLA DE ESPERANTO, Ref.: DATOS, C/ Rodríguez San Pedro, 13, 3º - 7, 28015 Madrid, o al correo electrónico admin@esperanto.es.

DOMICILIACIÓN BANCARIA

Titular de la cuenta:	
Banco o caja:	
Dirección de la oficina bancaria:	
Código postal:	Localidad:

IBAN:	<input type="text"/>	<input type="text"/>	<input type="text"/>	<input type="text"/>	<input type="text"/>	<input type="text"/>	<input type="text"/>	<input type="text"/>	<input type="text"/>	<input type="text"/>	<input type="text"/>	<input type="text"/>	<input type="text"/>	<input type="text"/>
	prefijo	entidad	sucursal	D.C.	cuenta									

Fecha:

Firma del titular: